FREŜA VENTO № 3.

LATVIO — BET ★ 57 — Lundo, la 17-a de julio

La PROGRAMO de la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj:

MARDO, 18.07.

9.00 – 10.00	Matenmanĝo				Studenta hotelo, 1-a etaĝo
10.00 – 12.00	Esperanto-kurso (paroliga)				BET-ejo, 235 ejo
10.00 – 12.00	Esperanto-kurso (progresintoj)				BET-ejo, 236 ejo
10.00 – 11.00	Somera Universitato	**Tuomo Grundström**	Finnlando	Finnlingva dialekta literaturo kaj ĝia prapatro Hjalmar Nortamo	BET-ejo, 125 ejo
11.00 – 12. 00		**Raita Pyhälä**	Finnlando	La finna pentristo Yrjö Saarinen	BET-ejo, 125 ejo
12.00 – 13.00		**Tuomo Grundström**	Finnlando	La stelulino de la finna dialekta poezio Heli Laaksonen	BET-ejo, 125 ejo
13.00 – 14.00	Tagmanĝo				Studenta hotelo, 1-a etaĝo
15.00 – 16.00	Seminario de Aktivula Maturigo (AMO -101)				BET-ejo, 125 ejo
19.00 – 20.00	Koncerto de kantistino **Anta Enģele**				BET-ejo, salono

La malfermo de BET-57

Foto: **Gražvydas Jurgelevičius** (Litovio)

La 16-a de julio

Tago, tageto … Bunta kaj riĉa kun lingvoj, kantoj, dancoj! Sed nun laŭvice …

Antaŭ la 11.00 horo matene salono pleniĝas kun gajaj kaj ridemaj homoj. Preskaŭ 120 samideanoj el 21 landoj. Eksonas Latvia kaj Esperanto himnoj. En la prezidio **Margarita Želve, Biruta Rozenfelde, Zenonas Sabalys** kaj **Tõnu Hirsik**.

Festparoladoj kaj gratuloj. La BET- 57 estas malfermita.

Tradicie la organizantoj konatigas kun loka kulturo. Ĉifoje bone kunfluis folkloro kaj Esperanto. **Ilga Porniece** (nepino de aktiva esperantisto en Ventspils dum 20-j jaroj pasintjarcente Andrejs Pornieks) gvidas du folklorajn grupojn, kiuj ĝojigis la partoprenantojn. Gajajn kaj iomete sentimentajn popolkantojn livlingve kantis grupo **„Kāndla”** („kantelo”), en loka dialekto kantis grupo **„Ventiņ”**). Ovaciojn ricevis de ili esperantlingve plenumita „Bele kantu, najtingal’” .

Ankaŭ vespere sonis kantoj. Estis koncerto de la folklora grupo **„Sītava”** el Puze apud Ventspils. Oni povis aŭdi kantojn en diversaj lingvoj - eĉ en Esperanto! Kaj … oni ankaŭ nin dancigis! Jen, kiel riĉa tago!

Līga Siliņa (Latvio)

Elpaŝas la grupo **„Kāndla”**

Foto: **Māra Timermane** (Latvio)

Elpaŝas la grupo **„Ventiņ”**

Foto: **Māra Timermane** (Latvio)

Elpaŝas la grupo **„Sītava”**

Foto: **Māra Timermane** (Latvio)

Estimataj BETanoj! Reehu! Kunlaboru! Verku! Ni atendas viajn artikolojn, poezion ktp.

La numeron preparis: Organiza komitato de BET-57, kompilis, Genovefa Tamane.